

# La letero de l' *Akademio de Esperanto*

N-ro 19 : Aprilo – Majo – Junio 1992

ISSN 0986 - 1181

## Perspektivoj



La 28-an de Majo okazis en Parizo la statuta jarkunveno de *la Amikoj de l' Akademio de Esperanto*. Banalaj decidoj asociaj (aprobo de raportoj, elekto de novaj Konsilianoj); grava punkto de l' tagordo tamen estis la nombrado por la balotado de novaj membroj en la Akademion. La protokolo starigita antaŭ la fino de tiu kunveno montris, ke la Akademianoj alektis naŭ novajn Kolegojn. En la ĉi-numeraj *Oficialaj Informoj de la Akademio* vi trovos ne nur la nomojn de tiuj elektitoj sed ankaŭ la aktualan konsiston de la tri "Trioj" de nia Zamenhofa Instituto.

Tamen post tempopaso, ŝajne devus montriĝi plej perspektivaj du punktoj el la *Diversaj demandoj* de la tagordo.

\*

La unua el tiuj du punktoj koncernas eldonajn. Efektive la kunveno decidis pri la lastaj eldon-detaloj de la *AKTOJ de la Akademio, III (1975 - 1991)*, kiu estos statute publikigita, kiel la n-ro 11 de la *Oficiala Bulteno de la Akademio*. La kunveno de la Amikoj decidis, ne nur ke ĝi estos presita ĉe Connier, la presisto de *La Letero*, sed ankaŭ, ke la deponejoj por tiu publikaĵo estos kaj UEA kaj SAT, same cetere kiel por la *AKTOJ I kaj II*; des pli, ke nia asocio ne estas ekipita por mem distribui tian broŝuron, dum ambaŭ grandaj mondaj asocioj afable konsentis ankoraŭfoje surprizi tiun rolon. La *Aktoj III* donos diversajn detalojn pri la laborado de l' Akademio dum tiuj 16 jaroj. Oni facile konstato per tiu historia dokumento, ke la laboro plej intensis dum la sesjara periodo 1983-1986, kiam la Akademio studis ĉefe la landnomojn por respondi al la atendo de sufiĉe multaj samideanoj, krom al evidenta breĉo en nia lingvo. Nia Zamenhofa Instituto tiam eldonis seriozan bazon, por ke la movado povu definitive alfinigi la disputojn kaj la t.n. "*haoson de landnomoj*". Almenaŭ se la movado kaj ĝiaj ĉefaj protagonistoj tion deziras.

\*

Koncerne al la dua punkto la kunveno aŭdis pri projekto de *Kolokvo pri la Stato kaj la Estonteco de la Lingvo Esperanto* kaj aprobis ĝian principon. Ĝi tamen decidis, ke la unu-jara periodo 1992 - 1993 estos dediĉita al la materia preparo de la Kolokvo: elekto de loko estas grava afero kaj ekzemple elekti grandan urbon ne ŝajnus celtrafa, ĉar tio tro riskus pezi sur la buĝetoj de la partoprenantoj. La organizo de tia aranĝo, por kiu la aŭspicio de UEA estos petata, montriĝas tre kompleksa kaj ĝia disvolviĝo estas planita por somero 1994. Cetere vi legos koncernan artikolon en ĉi tiu numero. Ni tiam esperas renkonti multajn amikojn, legantojn kaj legontojn de nia organo.

Tiu Kolokvo aperos ĉe la centa datreveno de la eldono de *Hamleto* en la traduko de Zamenhof; dato memorinda, ĉar eblas ĝin konsideri kiel la dato, kiam nia lingvo asertis sin kiel kultur-lingvon. Ĝuste tiun aspekton la kolokvo havos kiel ĉefan taskon demonstri laŭ ĉiuj ĝiaj eblaj facetoj. Ĝi demonstros ĝin ankaŭ praktike per diversaj kultur-vesperoj. Ĝi ankaŭ estos okazo por la motoroj de nia movado montri kiel ili vidas kaj pripensas la venontan disvolviĝo-vojon por nia lingvo kaj nia movado. Ĝi estos momento, kiam ĉiuj partoprenantoj retrovos novajn fortojn kaj esperojn por pace sed decideme alfronti la indiferentan mondon.

Aprobantoj ne hezitu skribi al mi aŭ al la Redaktoro por anonci sian partoprenon, jen kiel prelegantoj, jen kiel diversaj agantoj, jen ankaŭ kiel partoprenantoj. Ĉiuj estu bonvenaj.

D-ro André ALBAULT

OFICIALAJ INFORMOJ  
DE LA  
AKADEMIO DE ESPERANTO

Sendependa Lingvo-Institucio fondita de D-ro L.L.Zamenhof en 1905

**Nova konsisto de la Akademio**

\*

La 28-an de Majo, okaze de Kunveno de la *Amikoj de l' Akademio* en Parizo, estis reelektitaj 10 membroj submetitaj al la rebalotado de la eliranta Triono kaj nove elektitaj jenaj naŭ samideanoj al diversaj postenoj en la Akademio:

*F-ino Kremona Marinova BACEVA, kaj S-roj Donald BROADRIBB, André CHERPILLOD, Jorge Camacho GORDON, Boris KOLKER, Daniel MOIRAND, Klaus SCHUBERT, Amri WANDEL, YAMASAKI Seikô.*

**Sekve de nun la konsisto de la Akademio estas jena:**

**Unua Triono (eliro en 2001) :** BERNARD, BROADRIBB, CHERPILLOD, DAŠGUPTO, GOLDEN, KOLKER, KRAUSE, LI, MINNAJA, MOIRAND, RÉGULO PÉREZ, SCHUBERT, TONKIN, YAMASAKI, WANDEL.

**Dua Triono (eliro en 1995) :** ARI-MARTINELLI, BACEVA, BOULTON, CHAVES, DUC GONINAZ, EICHHOLZ, GREGOR, ĜUĜEV, KNOEDT, OLIANOV, PIČ, ROSBACH, URBANOVÁ, WELLS, XIE.

**Tria Triono (eliro en 1998) :** ALBAULT, BERVELING, BORMANN, DE'GIORGI, DE KOCK, GORDON, HAUPENTHAL, KISELMAN, LO JACOMO, MATTOS, MILOJEVIĆ, PETTYN, RAGNARSSON, STØP-BOWITZ, THIERRY.

Nun la Akademio balotos por sia Estraro kaj sia Direktoraro.

Por la Akademio,  
ties Prezidanto :  
D-ro André ALBAULT

REPRESO petata!

# Kroniko de la Nuntempo



## *La celoj de La Letero de l' Akademio*

La ĵus okazintaj balotoj alvenigis en la Akademion naŭ novajn membrojn; tial eble estas oportune rememorigi la celojn de *La Letero de l' Akademio*.

Antaŭe la Akademio de Esperanto havis ĉiujare nur unu okazon kontakti kun la Esperantista Popolo : tio estis dum la Universala Kongreso, kiun post la Unua Mondmilito plue organizis Universala Esperanto-Asocio . . . Versajne pro tia malofteco venadis kritikoj kaj protestoj, interalie de s-ro Ŝulco, kiu ne hezitis deklari, ke la Akademio laboras en "kaŝejo"!

Nun de kvin jaroj aperas la kvaronjara *Letero*, plej unue konceptita kiel tribuno por la membroj de la Akademio, sed kiu fakte nun ebligas publikigi opiniojn de geakademianoj kaj gelegantoj, kaj ankaŭ respondojn al eventualaj demandoj : ĝi diskonigas ankaŭ la oficialajn informojn de la Akademio, kiuj rezultas el laŭstatutaj voĉdonoj, eĉ kiam oficialaj bultenoj de asocioj neglektas aŭ rifuzas fari tion.

Tiel falas la subdiroj pri la agado de la Akademio : *La Letero* konsistigas ian forumon malfermitan al ĉiuj por pridiskuti la lingvajn demandojn senĉese levatajn de la evoluo. Ĝin karakterizas libera opiniado, kaj pro tio estas revokinde unu plian fojon : "Ne gravas, se iafoje vi ne konsentas . . . La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii tian neceson! Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!"

Bonvenon al la nov-alvenintoj!

J.T.

# K O L O K V O P R I L A S T A T O K A J L A E S T O N T E C O D E L A L I N G V O E S P E R A N T O

*La Amikoj de l' Akademio de Esperanto* akceptis la principon organizi por la somero 1994 *kolokvon*, kiu daŭros unu semajnon.

Ĝi petos aŭspiciojn de UEA.

Ĝia celo estos doni oportunecon al kompetentaj eminentuloj de la Esperanto-movado, inter ili Akademianoj, eksponi sian vidpunkton, perspektive al venontaj ago-direktoj por nia movado, pri la aktualaj problemoj, kiujn alfrontas nia lingvo en la nuna rapide evoluanta mondo.

Ĉeestos tiun Kolokvon ĉiuj personoj, kiuj estos pagintaj kotizon. La prelegoj aperos en volumo sub la titolo: "*Aktoj de la Kolokvo pri la Stato kaj Estonteco de la Lingvo Esperanto*". Laŭ ebleco, la prelegantoj ricevos ian modestan honorarion.

Debato inter la prelegantoj estiĝos tuj post ĉiu prelego; la publiko povos prezenti demandojn kaj tiel partopreni la debaton, kies tuto estos registrita. Redakto-komitato decidus ĉu kaj kion publikigi el tiu debato.

La vesperoj, laŭ ebleco, estos dediĉitaj al kulturaj manifestiĝoj : ekz-e, teatra vespero, varietea vespero, kant-arta vespero.

Tute aparte ne devus manki, ekzemple, prezento de fama deklam-peco el *Hamleto*, honore al Zamenhof kaj okaze de la datreveno de lia memorinda traduko (1894), ĉar la plena prezentado de *Hamleto* bedaŭrinde ŝajnas momente ekster la atingeblo de la rimedoj de la Esperanto-movado.

La prelegoj koncernos ĉiujn aspektojn de nia lingvo kaj la definitivaj titoloj estos elektitaj en akordo kun la prelegantoj. Ili estos strikte limigitaj al 30 minutoj kaj la prelegantoj devos liveri la tekston antaŭ difinita dato, por ke ilia presado estu certigita. Tiuj prelegoj apartenos al diversaj sekcioj kaj ni hodiaŭ povas imagi la tuton, ekzemple, jene :

## 1. Esperanto kiel lingvo :

La nuna lingvo kompare al la lingvo el la Zamenhofa tempo.

La sistemo de afiksoj kaj la 15-a Regulo de l' Fundamento.

La t.n. naturalismo en Esperanto.

La t.n. skemismo en Esperanto.

La literatura lingvo Esperanto.

La ĉefaj skoloj literaturaj de la pasinta jarcento.

La faka kaj scienca lingvo Esperanto.

La uzo de Esperanto kiel lingvo-ponto.

## 2. Esperanto kiel kultur-portanto :

La antikvaj kulturoj, precipe la Hellena kaj Latina, tra E-o.

La Eŭropa kulturo kaj Esperanto.

La Azia kulturo kaj Esperanto.

- La Afrika kulturo kaj Esperanto.
  - La teatro kaj Esperanto.
  - La kant-arto kaj Esperanto.
  - La operoj kaj Esperanto.
  - Esperanto kiel lingvo-ponto en literaturo.
- 3. Esperanto kiel lernobjekto :**
- Ĝenerala lingvo-pedagogio aplikata al Esperanto.
  - La diversaj metodoj kaj iliaj aplikokampoj.
  - La rezultoj : malfacilaĵoj kaj sukcesoj.
  - La propedeŭtika valoro de Esperanto.
- 4. Esperanto kiel scienca objekto :**
- Esperantologio kaj Interlingvistiko : celoj kaj atingoj.
  - Esperanto kaj ĝiaj fontlingvoj.
  - Esperanto inter la aliaj lingvoj : ĉu ĝi estas Latinida?
  - Esperanto inter aliaj planlingvoj.
  - Esperanto kaj la Hellena-Latina heredaĵo. Aliaj influoj.
  - Nia skribo en rilato kun la Latina skribo tra la mondo.
- 5. Esperanto en la praktiko :**
- Esperanto kaj informadiko.
  - Disvastiĝo de Esperanto tra la mondo.
  - Sociologio de la Esperanto-movado.
  - Esperanto en la diversaj sektoroj de la moderna vivo.
  - Esperanto en komerco.
  - Esperanto fronte al la politika mondo.
  - Esperanto en turismo.
  - Esperanto kiel interamika lingvo.
  - Esperanto ĉe la denaskaj Esperantistoj.
- 6. Esperanto en la okuloj de la aliaj :**
- Esperanto kaj la sciencistoj.
  - Esperanto kaj la registaroj.
  - Esperanto kaj la instruistoj.
  - Esperanto kaj la homoj sur la strato.
- 7. Esperanto kaj informado :**
- Rimedo de la Esperanto-informado.
  - Celoj de la Esperanto-informado.
  - Stiloj de la Esperanto-informado.

Plus la titoloj, kiujn vi leganto imagos; plus la titoloj, kiujn vi prelegonto proponos anstataŭe kiel pli bonaj . . .

D-ro André ALBAULT

# REAGOOJ

## *Denove pri feminismo :*

S-ino Cathy Schulze skribis i.a., ke la frazero de D-ro Albault, kiun ŝi citis el lia priskribo pri la proceduro por kandidatoj por la Akademio, *kontribuas al la supozo*", ke (tia kandidato) devas esti iu "li".

D-ro Albault reagis per tuta rezonado por montri, ke en Esperanto – same kiel en multaj Eŭropaj lingvoj – oni uzas la viran *li* ne nur por indiki iun viran personon, sed ankaŭ por indiki iun personon, kies sekson oni ne intencas emfazi. En tio li pravus, kiom koncernas la faktan uzadon. Sed kion li ne respondas, kaj kio laŭ mia supozo ja estas la kerno de la demando, tio estas, ke *envere* tiu vortigo *kontribuas al la supozo ke devas esti iu "li"*. En tio s-ino Schulze ja nepre pravus! Eĉ se ne estas la intenco substreki tiun supozon, la simpla uzado tiea de nur *li* tion supozigas – minimume por kelkaj homoj. Tial, miaopinie, estas saĝe uzi en tiaj cirkonstancoj la duoblan *li/ŝi* aŭ ĉirkaŭfrazo per *tiu*. Persone tamen la unuan solvon (*li/ŝi* aŭ *ŝi/li*) mi trovas pli agrabla, ĝuste ĉar la duobligo de l'pronomoj montras, ke ja vere ekzistas tiu elektableco inter *li* kaj *ŝi*.

Alia ebla solvo povus esti, ke la esperantistaro iom post iom alprenus la kutimon uzi *ĝi* por homoj, kiam ne necesas emfazi la sekson de la persono. Sed tio almenaŭ momente ne estas nia kutimo.

Gerrit BERVELING

*Ndir* : Ni agnosku, ke la nuna uzado ne donas veran solvon al tiu problemo. La uzado jam rifuzis, malgraŭ la ekspresa konsilo de Zamenhof (LR 90, 91), la pronomon *ĝi*, kiam temas pri infano, aŭ homo. Aliparte la grafismo *li/ŝi* ja ne estas elparolebla [ne pli ol la grafismo : sinjor(in)o]. Eble oni do devus enkonduki la esprimon aŭ *li* aŭ *ŝi* (?), same kiel aŭ sinjoro, aŭ sinjorino.

Eble tiu solvo ŝajnas plaĉa al ĉiuj? Efektive, la pli mallonga grafismo eble taŭgas en iuj demandoj, sed certe ne konvenas en libera parolo aŭ en literaturaj tekstoj.

## *Denove pri La Chaux-de-Fonds*

Probable oni nomis tiun lokon pro kaj laŭ ĝia produktado (kaj produkto) : la kalko. En tiu nomo "*fonds*" ankaŭ signas valon, valeton (fermitan); "*chaux*" retroviĝas ankaŭ en la nomo de la arbarego "*Chaux*" inter la "*Doubs*" kaj la "*Loue*" en la Franca "Jura"; ĝi nomas kalkan lokon en la sama idiomato!

Do la signifo povus esti *la kalko de la fundoj*.

En Francio oni konas ankaŭ *Chauffour* kaj *Chaumont* . . . t.e. kalkoforno kaj kalkomonto! Sed preskaŭ neniam oni uzis *chaux* por nomi varman lokon, por kiu oni preferas *chaud*; ekz-e, *Chaudes Aigues* (Varmaj akvoj), *La Vallée Chaude* (La Varma Valo).

Supozeble *La chaux des fonds* poste iĝis *La Chaux-de-Fonds*. Sed tiun lokon mi nomus tutsimple per *Ŝodefundo*, ĉar en Esperanto *fundo* ne entenas la silabon *on!* – Marc LOUSTE.

*Ndir* : ĉu ne la formo *Kalkofundo plej bone rezultus el la ĉi-supraj konsideroj? Interkrampe : vere mondoskua demando!*

## Ĉu Ĝenovo situas norde de Italujo?

Se oni volas indiki, kie situas Svislando, oni probable dirus, ke la lando situas *norde de Italujo*. Foliumente en PIV, oni trovas, ke Ĝenovo estas *havenurbo norde de Italujo*.

Oni apenaŭ dirus pri la urboj ĉe la Svisaj lagoj, ke ili estas havenurboj, kaj la Svisoj certe aprecus havi havenurbon kiel Ĝenovon.

Ne temas, ĉi tie, pri takso de la geografiaj scioj de la leganto. Temas pri la fakto, ke la esprimo *norde de* evidente havas du signifojn : 1) *pli norde ol*, 2) *en la nordo de*.

Ĝuste geografiaj indikoj devas esti tre precizaj. Ne temas ĉiam pri konataj landoj kaj urboj, kiel la menciitaj. Oni scias, verŝajne, ke Ĝenovo estas urbo, kaj ke Svislando estas lando, kiu, do, ne povas trovi en alia lando. Povas facile temi pri vilaĝoj aŭ eĉ pri malpli grandaj lokoj. Tiam devas ne ekzisti dubenca informo, kiu kondukas la vojerĉanton al malĝusta loko.

Oni povas imagi similajn problemojn pri la paro *antaŭa / malantaŭa*. Mi spertis ĉiun jaron, ke junuloj lernantaj la Germanan lingvon, ofte malfacile vidas la diferencon inter la prepozicio *hinter* kaj la adverbo *hinten*.

Kaj kion vi dirus pri paciento, kiu konsultante kuraciston diras, ke li havas dolorojn en *la antaŭa kapo*?

Johan Hammond ROSBACH.

**NDIR** : *evidente la antaŭo de l'kapo aŭ la kapantaŭo estas sendubaj esprimoj, same kiel la nordo de Italujo, en kiu povas trovi io! Antaŭ la kapo kaj norde de Italujo same klaras sed esprimas ion alian.*

*Aliflanke la aktualajoj montris al ni, ke landoj povas trovi en pli vastaj landoj! Ekzemple Uzbekistano ĝis nun trovi en Sovetio kaj nun estas parto de la Komunitato de Sendependaj Ŝtatoj. Sed daŭre Akvitanio, Langvedoko kaj Francilio (= Ile de France, en kiu loĝas Franciliens = Francilianoj) estas partoj de Francio.*

---

### Konservo kaj fortikigo de la Lingva Unueco.

Por rapidigi la solvon necesas, ke la rimedo estu kiel eble plej ellaborita, maksimume perfekta, tiel ke en ĉiu momento ĝi plene taŭgu por la samtempaj bezonoj de internacia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Ĉar ĉio evoluas kaj lingvo reflektas tiun evoluon, ĝi signifas, ke necesas daŭre plu evoluigadi la Internacian Lingvon, praktike ĝin uzadi, riĉigadi ĝin per nova kultura enhavo, sed samtempe konservi ĝian absolutan unuecon. Tiun rolon plenumas la kreskanta literaturo kaj la vastiganta uzo de la lingvo sur diversaj kampoj. Siavice, la ampleksiĝo de la praktikaj aplikoj de la lingvo entenas danĝerojn por la lingvounueco. En tiaj kondiĉoj la rolo de la Akademio de Esperanto, ekde la komenco rekonita de ĉiuj kiel la supera lingva instanco, fariĝas eĉ pli grava, ol antaŭe. Tial rigora observado de la decidoj kaj rekomendoj de la Akademio estas antaŭkondiĉo por ĉia ajn plua sukcesa laboro por la Internacia Lingvo. (Lapenna : Esperanto en Perspektivo, p. 797).

# Demandoj kaj Respondoj

Ne gravas, se iafoje vi ne konsentas . .

*La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstari-  
go de ideoj! La sola problemo estas konscii tian neceson!  
Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭsta-  
ron de homoj!*

D- Kio pri la diftongo *iŭ*? Ĉu ĝi apartenas al la Internacia? Ĉu uzebla, ĉu evitinda? Ĉu ĝi povus reprezenti pli-malpli la uon Franca/Nederlandan, la *ii*-on Germanan/Turkan? (C. J. Günkel)

R: *La fonologio de nia lingvo estis nur supraĵe studata, sed oni povas akcepti la ideon, ke tradicie ŝi estas uzata nur en la du diftongoj aŭ kaj eŭ, kiuj cetere respondas aŭ fonetike, aŭ transskribe al la au kaj eu de la Eŭropaj lingvoj (kaj ankaŭ de multaj aliaj lingvoj).*

*Aliparte ekzistas laŭ PIV du vortoj kaj sep Ĉinaj propraj nomoj, kiuj prezentas tri-an diftongon, nome oŭ (poŭpo, toŭfuo – Fuĝoŭ, Guĝoŭ, Gengĝoŭ, Hangĝoŭ, Hankoŭ, Langoŭ, Suĝoŭ) [laŭ ne publikigita esplor-laboro super PIV pri la fonologia konsisto de nia vortrezoro, kiu i.a. montras, ke enestas 268 vortoj kun -aŭ, kaj 114 kun -eŭ]. Ekster PIV mi renkontis du-tri aliajn vortojn kun la diftongo oŭ. Sed mi neniam renkontis vortojn kun diftongo iŭ aŭ uŭ! Mi tre scivolos, en kiuj lingvoj ili eble troviĝas. La streteco de la vokaloj i kaj u ne faciligus la kreadon de tiaj diftongoj; ili ĝis hodiaŭ ekzistas ĉefe kun la vasta vokalo a, multe malpli kun la duonvasta e, apenaŭ kun la alia duonvasta o.*

*Redonon de la Germana ŭ, Franca u, ktp: La Rusa, kiu ofte estas modelo por Esperanto, reprezentas tiun sonon per propra diftongo-litero, nome per la ligatura litero ŭ prononca ta =(ju). Sed ŝajne Zamenhof mem transskribis tiun sonon per ordinara u! Ekz-oj : G. flüster (= flustri), G. Kajüte, R. kajota (= kajuto), F p(ë)luce, G. Plüsch, R. plioŝ (= pluŝo), F. prunelle, G. Prünelle (= prunelo), F. truffe, G. Trüffel, R. triofel (= trufo), G. Türkis (= turkizo). Ankaŭ Nurnbergo estas Zamenhofa (= G. Nürnberg). Escepto ŝajnas esti la Fundamenta liuto [A. lute, F. luth, G. Laute, R. liŭtna =(ljutnja)]; sed ĝi estas inspirita de la Itala formo : I. liuto. Zamenhof preferis la Italan grafismon iu sed ne la Italan kaj Rusan sonon, t.e. la sonon =(ju). Konstateble li neniel uzis la malfacile elparoleblan iŭ! Nepre necesas establi tiajn faktojn pri kompara fonologio aŭ pri kompara ortografio jam antaŭ ol entrepreni asimiladon de propraj nomoj. Ŝajnas pli bone, ke ĉi-lastaj sekvu la samajn regulojn kiel la ordinaraĵ vortoj. (A. A.)*

---

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO". trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. –

*Redaktoro* : Jean THIERRY. – *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX.

*Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. C. P. P. n-ro 6971. – *Prezo* : 1 n-ro : 40 FRF Jara abono : 120 FRF Pagebla ĉe kontoj :

*Banka* : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – *Poŝtekkonta* : 735 27 B Paris. – UEA : Poŝta banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag) : precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

*Perantoj por diversaj landoj* :

*Aŭstralio* : Libroservo de AEA, Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

*Azio (tuta)* : S-ro UMEDA Yosimi, I. P. O. B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

*Brazilo* : Brazila Esperanto-Ligo : ScS Ed Jockey Club-Sala 103. BR 70300-BRASILIA DF (caixa postal 11 11 05), Brazilo.

*Germanio* : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio. Poŝtĝiro Hannover (bankkodo 250 100 30), konto-n-ro 5706 31-301.

*Kubo* : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (Eo-redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

*Meksiko* : S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF, Meksiko.

*Svedio* : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

*Usono* : Eldonejo Bero : P. O. Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.